



Venontaj eventoj

👉 **Hodiaŭ** 👈

★ **2:00 pm:** Paŭleto instruos dancadon. Kunvenu en lia salono, Asante #223.

★ **7:30 pm:** filmovespero: *Conlang kaj Flugigi polpon* ("Flying an Octopus")

Sabato

★ **9:00 atm:** Programo de ESF. Kunvenu en AP&M 4301. (Detaloj en Fasko no. 8)

★ **7:00 pm:** Festo ĉe d-ro David JORDAN. Kunvenu antaŭ la loĝejoj je la 7-a por iri piede al la bushaltejo.

Dimanĉo

★ **11:00 atm:** Ekskurso al la urbocentro de Sandiego: Parko Balboa, Kvartalo *Gaslamp*, haveno kun militŝipoj...

Lundo

★ **7:30 pm:** Te-festo (kaj te-bingo!) kun Jodi

La NASKa Fasko

Redaktejo: Asante n-ro 116
knask.esperanto@gmail.com

La NASKa Fasko aperas lunde – vendrede dum la kursaro. Kutime ĝi aperas tagmeze. Se vi ne ricevas ĝin post la matenaj klasoj aŭ en la manĝejo, prenu ekzempleron el la skatolo kiu troviĝas sur la fenestro de la redaktejo.

Ni avide atendas viajn artikolojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, poemojn, viajn am-leterojn... preskaŭ ion ajn! Memoru, la Fasko estas taggazeto **por vi kaj pri vi**: viaj kontribuajoj igas ĝin interesa. Do nepre kontribuu!

Se vi ne sentas vin tute kompetenta pri verkado, ne timu; ni volonte helpas vin korekti kaj poluri. Serĉu unu el niaj lingvo-helpantoj; sur siaj nomŝildoj ili portas specialajn glumarkojn kun rideto (☺) – kaj ili ridetante helpas vin korekti, poluri, kaj plibonigi vian verkon. Kiam la verko pretas, sendu ĝin per retpoŝto al la adreso supre, aŭ simple portu ĝin piede al la redaktejo.

Salutmesaĝo de Amri WANDEL

D-ro Wandel instruos en kaj la supera kaj la meznivela klasoj venontsemajne.

Karaj gelernantoj kaj gekolegoj, tiu ĉi estos mia kvara partopreno en la Nord-Amerika Somera Kursaro kiel instruisto, kaj mi jam sopire anticipas la renkontiĝon kun la konataj kaj novaj geamikoj – studentoj kaj instruistoj de nia ŝatata lingvo.

La du unuaj fojoj estis kadre de San-Francisko Ŝtata Universitato, sub la gvidado de nia karmemora Cathy SCHULZE, en 1985 kaj 1988. Poste mi plurfoje estis en Kalifornio kiel gastprofesoro de astrofiziko en la universitato de Losanĝeleso (UCLA), sed nur antaŭ du jaroj mi revenis al NASK. Mi tuj konstatis ke du jardekoj kaj translokiĝo al Sandiego ne ŝanĝis la plaĉan internacian familiecan verdan etoson, kaj adiaŭante en 2008 promesis baldaŭ reveni.

Ĉi-somere mi plenumas la promeson – eble pli rapide ol iuj anticipis – kaj cetere mi ne revenas sole. Kun mi venas el Israelo Shirley – nova juna lernantino de Esperanto, kiun vi fakte jam renkontis antaŭ min. Shirley estas la unua israela lernanto de NASK, kaj ŝia partopreno realiĝis dank’ al la helpo de mirinda virino kiun multaj en NASK konas kaj admiras – Alberta CASEY. Koran dankon Alberta, kaj ankoraŭ multajn jarojn da agado kaj kontribuo al Esperanto!

Kvankam mi venos nur por la lasta se-




majno, mi instruos en du niveloj, pri du temoj. Kun la supera nivelo mi laboros pri la fascina temo de astronomio kaj la universo. Ni studos elektitajn ĉapitrojn el mia libro *La Kosmo kaj Ni*. Kun la meza nivelo mi havos prelegon kaj poste debaton pri la temo “Esperanto en la Ombro de la Angla”, pri kiu mi prelegos en la kongreso de UEA en Havano, kadre de la Esperantologia Konferenco.

Ĝis baldaŭ!

La sekreta Esperanto-armeo

Multaj esperantistoj jam scias ion pri la kurioza angla-lingva manlibro *Esperanto: The Aggressor Language* (“Esperanto: Lingvo de la Agresanto”) kiun eldonis la usona armeo dum la fruaj jaroj de la malvarma milito.

“La Agresanto” estis rolo de fikcia malamiko, kiun kreis la usona armeo por siaj diversaj militaj ekzercoj. Por ke la armeo de la Agresanto ŝajni



sufiĉe fremda, usonaj soldatoj kiuj ludis la rolon uzis Esperanton por komunikiĝi inter si sur la batalkampo. Armea manlibro numero FM-30-101-1 instruas bazan gramatikon kaj multajn vortojn rilate al militaj temoj: armiloj (*flamjetilo, grenadjetetgilo*), rangoj (*ĉefserĝento, regimentestro*), veturiloj (*duontirilvagono, destrojero*) ktp.

Sed malmultaj scias, ke la

(daŭrigo en paĝo 2)

(daŭrigo de paĝo 1)

historio de la Agresanto (kaj ties uzo de Esperanto) estas multe pli profunda kaj detala ol la supraĵa resumo en tiu mallonga manlibro.

Efektive, oni elpensis ege detalan “alternativan historion” por fari la Agresanton pli realisma. La Agresanto estis ne nur armeo, sed federacio de ŝtatoj sub la regado de politika partio kun sia propra historio, registaro kaj ideologio – ĉiuj interplektitaj kun la uzo de Esperanto kiel komuna lingvo.

Lastatempe, NASK ricevis aŭblan donacon de multaj malnovaj gazetoj de profesoro Reg JADERSTROM, kiu instruis ĉe NASK en pasintaj jaroj. Inter la ricevitaj trezoroj estas numero de *Amerika Esperantisto* (majo-aŭgusto, 1964), en kiu aperis anglalingva artikolo pri la Agresanto-programo. Jen kelkaj elĉerpaĵoj, enesperantigitaj:

Kiam ajn soldatoj de la usona armeo ekaktiviĝas dum manovroj en trejn-ekzercoj ... ili renkontas fortan, organizitan repuŝon de la

“Agresanto” – bone trejnita malamiko kiun oni ofte nomas “Triangulo.” Vestita en ĝangal-verda uniformo kaj parolanta la strangan lingvon Esperanto, Triangulo estas vera malamiko, malgraŭ tio, ke li reprezentas fikcian landon kies totalisman registaron regas la senkompata politika partio Cirklo-Triangulo...

La Centro de la Agresanto [fako de la usona armeo] direktas kaj kontrolas la trejnadon de batal-kampaj konsilantoj, havigas aŭ fabrikas uniformojn kaj ekipaĵojn por la trupoj de Triangulo, kaj faras instruajn manlibrojn. Teamoj de la Centro konsilas komandantojn pri trejnado, taktiko, kaj uniformoj de la Agresanto, kaj ili helpas doktrinigi agresantojn en la politikan filozofion de Cirklo-Triangulo.

Legu la Faskon venontsemajne por ekscii pli pri la mistera partio Cirklo-Triangulo – ŝajne, ĝi ankoraŭ ekzistas! Kaj eĉ pli mistere, ni trovos ĝiajn spurojn ĉe UCSD...



Well-concealed Aggressor with light machine gun lies in wait for his U.S. enemies.

Foto el la artikolo en *Amerika Esperantisto*

La unua usona KER-ekzamensio

de Katalin KOVÁTS

Post du preparsejtoj de Katalin pri la historio kaj disvolviĝo de la novaj ekzamenoj la 5-an de julio – paralele kun la SES-partoprenantoj en Slovakujo – okazis la unuan fojon en Usono (kaj ekster Eŭropo) KER-ekzamensio. Antaŭ la komisiono, formata de Katalin KOVÁTS kaj Duncan CHARTERS, ekzameniĝis 13 kandidatoj, 11 personoj el Usono, po 1 el Meksiko kaj Kanado.

La novtipa ekzamensistemo de UEA kaj la hungara ITK funkcias la duan jaron kaj ĉi-jare ankaŭ NASK-anoj havis la oportunon konatiĝi kun ĝi. La plej populara nivelo estis C1 (la ekzistanta plej alta), kiun trapasis 10 personoj, studentoj kaj ankaŭ NASK-instruistoj. Estis ĝojige, ke danke al la helpo de kelkaj partoprenantoj de NASK, kreiĝis eblo finance subteni ekzameniĝon de 3 talentaj junuloj, por kiuj la ekzamencostoj montriĝis malfacile pageblaj.

La materialo lunde ekvojaĝos al Hungarujo, kie okazas la korektado kaj taksado, kaj de kie revenos la diplomoj fine de aŭgusto. Ĝis nun en Usono estis nur 3 KER-diplomitoj el la tutmondaj 138. Per la nuna ekzameno Usono (espereble) havos 14 personojn kaj per tio eniras la unuajn 5 landojn de la populareclisto.

Ni kore gratulas al ĉiuj kuraĝuloj, nome al: Yoshiki KOMORI (CA), Kristy LOMMEN, Gilda Monos BONILLA (MX), Lee MILLER, Orlando RAOLA, Jeremy ALDRICH, Grant GOODALL, Hoss FIROOZNI, David GILLET, Steven CYBULSKI, Christine WINGROVE, Brandon SOWERS kaj Martha CARDENAS.

